Marjorie Boulton gvidis, dum la semajno 23. vii. 61-29. vii. 61., Intensan Kurson pri Esperanto en la malgranda sed bonfama Wedgwood Memorial College, Barlaston, apud Stoke-on-Trent, Anglujo. Ŝi gvidis ĝin laŭ la principo, ke nura lingvoinstruado ne sufiĉas, sed ke oni devas kiel eble plej frue instrui pri la kulturaj kaj praktikaj flankoj de Esperanto kaj pri eblaj celoj kaj aktivaj post la baza lernado de la gramatiko.

Sigismundo Pragano, mond fama Cseh-instruisto, elstara ankaŭ kiel deklamisto de poemoj seriozaj aŭ bonhumoraj, speciale venis de Amsterdamo, kie li estas docento pri Esperanto kaj pri la rumana lingvo, por helpi en la kurso. (Ambaŭ gvidantoj laboris sen honorario, nur kontraŭ repago de elspezoj.) Doc. Pragano instruis Esperanton al la progresantoj, dum f-ino Boulton instruis la elementojn al tre novaj sed entuziasmaj komencantoj. Ambaŭ grupoj miris, pri sia rapida progreso. Estas nedubleble, ke enloĝa feria kurso tre helpas progresemulojn; oni lernas ne nur dum la oficialaj lecionhoroj, sed ankaŭ dum manĝoj ("Bonvolu doni al mi la butero." "N!" hore krias gekamaradoj. "Kie estas la salto?"—"Salo—salto estas leap."), dum paŭzaj konversacioj kaj eĉ, kelkfoje, en la banĉambro.

Sed la kurso konsistis el miksaĵo de intensa lingvoinstruado kaj pli larĝaj kulturaj temoj. Ĉar ĝi celis precipe geinstruistojn, estis prelegoj kaj diskutoj pri: "Instrumentoj por Esperanto"; "Ekzamenoj pri Esperanto"; "La Cseh-Metodo"; "Esperantaj Gazetoj, Lernolibroj, Legolibroj, Aŭdaj-Vidaj Helpiloj"; "Esperanto

en la Moderna Lernejo" kaj ankaŭ speciala sonbenda programo kun specimenoj de esperanta laboro inter gelernejoj kaj studentinoj.

Profesoro W. E. Collinson vojaĝis de Liverpool speciale por prelegi pri "Lingvisto Rigardas Esperanton" kaj partopreni en forumo kun f-ino Boulton, doc. Pragano kaj la klera juna esperantisto (jam konata kiel inteligenta recenzisto kaj aktiva gvidanto de **Junularo Esperantista Brita**) John C. Wells, kiuj respondis al multaj demandoj. Marjorie Boulton prelegis pri "La Dediĉita Vivo de L. L. Zamenhof" kun multaj lumbildoj aĉetitaj el la bonega U.E.A.-Foto-Servo de Henk Thien; Sigismundo Pragano prelegis pri "Rumanujo" kun muziko, filmoj, kaj rumana brodita bluzo (tiun lastan, f-ino Boulton portis). Estis ankaŭ prelegoj pri literaturo, kulturaj sonbendoj el la Magnetofona Servo de U.E.A., kaj aparte sukcesa literatura programo en kiu f-ino Boulton kaj doc. Pragano laŭlegis poemojn. La internacia filmoprezentado, kun esperantlingvaj filmoj el Norvegujo, Aŭstralio kaj Nov-Zelando, bona senparola filmo pri lerneja karavano esperantista, kaj kulturaj filmoj el Polujo kaj Cejlono, repagis per sia granda sukceso la multan organizan laboron.

La progresantoj preparis etan koncerton por la Distra Vespero kiun vizitis grupo de jugoslavaj gelernejoj. Lumbildoj tre helpis en la prelego pri "La Brita Esperanta Kongreso, Bournemouth, 1961" kaj "La Organizado de la Esperanto-Movado". Nova serio de lumbildoj, pri la Intensa Kurso mem, jam ekzistas. La kursanoj ankaŭ ekskursis al Lichfield, kie John Wells estis ilia esperanta gvidanto.

Tiu ĉi kurso estis relative malgrandskala, sed sukcesis ĉiurilate (eĉ en gazetaj raportoj); kaj la principo kaj metodoj eble sugestos eblecojn al aliaj, kiuj volas propagandi Esperanton serioze.

—MARJORIE BOULTON.

TO SKIN A PIG

A Simple Folk-Tale for Esperanto Students

A long time ago, in Germany, there lived a laborer named Joseph. But Joseph was not a German. He was born in Poland. He had a beautiful wife and two children in Cracow.

Joseph was very industrious and very thrifty in order to get enough money to bring his family to be with him. When he had almost enough money to pay for the trip, he was afraid that thieves might find the hiding place. So he decided to give his money to the banker whose bank he passed each day.

Joseph said to the banker, "Oh, honorable and trustworthy man, for many years I have worked repairing the utensils of both the rich and the poor to get the money to bring my family here. I greatly desire to embrace my wife and my two children, but I do not have enough money yet. I will have to work for one year more. Please guard my money until I can come to ask for it."

The banker replied, "I swear to you that your money will be safe with me. You will not even have to have a receipt."

So Joseph left, content. He worked and saved his money for another year. Then he returned to the banker and politely asked him for his deposit.

"Do you have a receipt?" asked the banker.

"Don't you remember?" answered Joseph, you told me that a receipt was not necessary."

"I never pay without a receipt; otherwise anyone could demand money from me," said the banker. He ordered his servants to put Joseph outside.

Afterwards, when Joseph returned to his wagon, he was very unhappy. He would have to work for many more years before he could see his family.

SENHAŬTIGI LA PORKON

Simpla Popolrakonto por Esperanto-Lernatoj

Antaŭ multaj jaroj, en Germanujo, loĝis laboristo nomita Jozefo. Sed Jozefo ne estis germano. Li naskiĝis en Polujo. Li havis belan edzinon kaj du infanojn en Krakovo.

Jozefo estis tre laborema kaj tre ŝparema, por havigi sufiĉan monon por venigi sian familion al si. Kiam li havis preskaŭ sufiĉan monon por pagi la vojaĝon, li timis ke eble ŝtelistoj trovos la kaŝejon. Do li decidis doni sian monon al la bankisto kies bankon li preterpasis ĉiutage.

Jozefo diris al la bankisto, "Ho, honorinda kaj fidinda homo, dum multaj jaroj mi laboris riparante la kuirilojn de riĉuloj kaj malriĉuloj por gajni la monon venigi mian familion ĉi tien. Mi ege deziras brakumi miajn edzinon kaj du infanojn, sed mi ankoraŭ ne havas sufiĉan monon. Mi devos labori dum plia jaro. Bonvolu gardi mian monon ĝis mi povos veni ĝin postuli."

La bankisto respondis, "Mi juras al vi ke via mono estos sekura ĉe mi. Estas eĉ ne necese ke vi havu kvitancon."

Do Jozefo foriris, kontenta. Li laboris kaj ŝparis sian monon dum plia jaro. Poste, li reiris al la bankisto kaj ĝentile petis de li la deponitan monon.

"Ĉu vi havas kvitancon?" demandis la bankisto.

"Ĉu vi ne memoras?" respondis Jozefo, "vi diris al mi ke kvitanco ne estas necesa."

"Mi neniam pagas sen kvitanco; alie, iu ajn povus postuli monon de mi," diris la bankisto. Li ordonis al siaj servistoj meti Jozefon eksteren.

Poste, kiam Jozefo revenis al sia ŝarĝvagono, li estis tre malfeliĉa. Li devos labori multajn jarojn pli, antaŭ ol vidi sian familion.

The next day he was repairing a silver teapot in the kitchen of the kind-hearted wife of a rich merchant. Joseph was alone, and felt so overcome with despair that he put his head in his arms and wept. In this same moment the kind-hearted woman entered. "What is troubling you?" she asked.

"I do not want to trouble you with my misery," said Joseph.

But the woman insisted. So Joseph told her his unhappy story. When Joseph finished, the woman was very thoughtful. After a few minutes she said, "I will help you get your money back. But you must do what I tell you. Go to the banker tomorrow, at exactly two o'clock, and ask for your money from him again. Act as if this were the first time and not the second."

The next day the woman put her jewels in a sack and went to the bank. She brought her servant girl with her. "Wait outside," the woman said to the servant girl, "until you see the tinker come out with his money. Then go in and say to me, 'Your husband has returned unexpectedly. You must come home immediately.'"

Well, a few minutes before two o'clock, the woman went into the bank. She showed her jewelry to the banker. "They are very valuable," she said, "and while my husband is away I am afraid of thieves. Can you guard my jewelry until my husband comes back, and give me a receipt for them?"

"I swear to you that your jewelry will be safe with me. It is not necessary to have a receipt," said the banker.

"But how will I be able to reclaim them?" asked the woman.

"You will only have to ask me," said the banker.

Now two o'clock struck, and Joseph came in. "Oh, honest man," he said to the banker, "I am asking you for my money which you have been guarding for a year."

The banker wanted to convince the

La postan tagon li riparis arĝentan tekruĉon en la kuirejo de bonkora edzino de riĉa komercisto. Jozefo estis sola, kaj sentis sin tiel venkita de malespero, ke li metis sian kapon sur siajn brakojn kaj ploris. En tiu sama momento la bonkora virino envenis. "Kio ĉagrenas vin?" ŝi demandis.

"Mi ne volas ĝeni vin pri mia mizero," diris Jozefo.

Sed la virino insistis. Do, Jozefo rakontis al ŝi sian malfeliĉan historion. Kiam Jozefo finis, la virino estis tre pensema. Post kelkaj minutoj ŝi diris, "Mi helpos vin rehavigi al vi vian monon. Sed vi devas fari kion mi ordonos. Iru al la bankisto morgaŭ, precize je la dua horo, kaj denove petu de li vian monon. Agu kvazaŭ ĉi tiu estus la unua, kaj ne memoru la alian fojon."

La sekvan tagon la virino metis siajn juvelojn en saketon, kaj iris al la banko. "Ŝi kunprenis sian servistinojn. "Atendu ekstere," diris la virino al la servistino, "ĝis vi vidos ke la soldisto eliras kun sia mono. Tiam eniru kaj diru al mi, 'Via edzo venis neatendite. Vi devas iri hejmen tuj.'"

Nu, kelkajn minutojn antaŭ la dua horo, la virino eniris la bankon. Ŝi montris siajn juvelojn al la bankisto. "Ili estas tre valoraj," ŝi diris, "kaj dum mia edzo forestas, mi timas pri ŝtelistoj. Ĉu vi povos gardi miajn juvelojn ĝis mia edzo revenos, kaj doni al mi kvitancon por ili?"

"Mi ĵuras al vi, viaj juveloj estos sekuraj ĉe mi. Ne estas necese havi kvitancon," diris la bankisto.

"Sed kiel mi povos repostuli ilin?" demandis la virino.

"Estos nur necese peti min," diris la bankisto.

Nun sonis la dua horo, kaj Jozefo eniris. "Ho, honesta homo," diris li al la bankisto. "Mi petas de vi mian monon, kiun vi gardas de antaŭ unu jaro."

La bankisto volis konvinki la vir-

woman of his honesty. He happily paid Joseph the money.

Full of joy, Joseph went out. Then the servant girl came in. She said loudly, "Madam, your husband returned unexpectedly. You must go home immediately."

The woman quickly put her jewels back in the sack. She put the sack in her pocket and hurriedly left, while the banker glared at her angrily.

Outside, the woman, the servant, and Joseph were very happy.

"Remember," said the woman to Joseph, "there is more than one way to skin a pig."

—Adapted by Ella Gibson,
ed. Bruce Kennedy.


inon pri sia honesteco. Li afable pagis al Jozefo la monon.

Plenĝoje, Jozefo eliris. Tiam la servistino eniris. Ŝi diris laŭte, "Sinjorino, via edzo neatendite revenis. Vi devas iri hejmen tuj."

La virino rapide remetis siajn juvelojn en la saketon. Ŝi metis la saketon en sian poŝon, kaj rapide eliris, dum la bankisto kolere rigardadis ŝin.

Ekstere, la virino, la servistino, kaj Jozefo estis tre ĝojaj.

"Memoru," diris la virino al Jozefo, "estas pli ol unu metodo por senhautigi la porkon."



NOVAJ LIBROJ

Belarto, Aŭtuno 1961. Red. William Auld. Eldonis Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1961. 68 p. Lingvo: boneta; preso: tre bona; karaktero: rekomendata; temo: ĝenerala distraĵo.

La duan fojon U.E.A. eldonis belartan suplementon al sia gazeto, aparte aĉetebla. Ĉi tiu kajero havas, kiel anticipible, tre varian enhavon. Ĝi estas distra, sed ne profunda, de literaturecaj artikoloj, tre taŭga por la persono kiu ne deziras ataki libron kaj kiun iom timigas la serioza tono de niaj literaturaj gazetoj. Amuzaj rakontoj, kaj kelkaj popularaj artikoloj, kontraŭpezas la pli obskurajn poemojn kaj tragediecajn rakontojn.

Kelkaj artikoloj multe meritas la legon. Inter ili, la simpozio "Pri literatura arto kaj Esperanto" havas multon dirindan, precipe la tre aprobinda kontribuo de Clelia Conterno.

La lingvo de la "Belarto" klare indikas la evoluadon de la lingvo esperanta, kaj ne plaĉos al harfendistoj. Elevatoro, anstataŭ lifto; popo, anstataŭ papo; konferansejo anstataŭ anoncisto aŭ direktoro, ktp. iom ŝokas unuavide, sed evidente ili estas tipo de la neevitebla evolado de la lingvo. Rakonto japana donas al ni bonan konon pri multaj specife japanaj aŭ aziaj terminoj (espereble iu kolektas tiujn terminojn, kaj la serion de similcelaj artikoloj en Oomoto, por eventuala enleksikonigo).

La leganto kiu deziras ion distran, preskaŭ Readers-Digest-ecan, ŝatos ĉi tiun verkon.

Omaĝo al Gaston Waringhien, speciala numero de Esperantologio, vol. 2, 1961. 96p., \$2.80, broŝurita. Lingvo: bona; preso: bona; karaktero: parte rekomendata; temo: lingvaj diskutoj.

Nur cent ekzempleroj de ĉi tiu libro estas pretigitaj, kaj nur 75 estas vendataj, kio estas bedaŭriga ĉar la belaspekta volumo estas bone presita kaj enhavas plurajn interesajn artikolojn.

Kiel supozeble, la kvalito de la artikoloj varias. Ĉiu devas havi ian rilaton kun Waringhien, kvankam foje la rilato estas nur imaga aŭ fabrikita por pravigi la aperon de la artikolo. Kelkaj pritraktas Waringhien-ajn temojn, aliaj specife lingvo-temojn. El ili, la artikolo de Collinson ("Pri Kelkaj Kulturvortoj", mencianta la originon de diversaj vortoj, ekz. civilizo, kulturo, naturo, kaj la evoluo de iliaj sencoj), tiu de Gregor ("La Funkcio de la Derivita Adverbo en Esperanto" kiu kategorizas la eblajn uzojn de derivitaj adverboj), tiu de de Hoog ("Interplektitaj Frazoj," pri akuzativ-problemo ne malofita), tiu de Setälä ("Pri la Artikolo, Precipe en Esperanto" pri simpla regulo por instrui la uzadon de la artikolo) havas speciale atentindan valoron, kvankam ili ne ĉiam solvas siajn proponitajn problemojn. Aliaj malpli valoras.

Bibliofiloj, kaj personoj speciale interesataj de lingvo-diskutoj, ŝatos la volumon. Aliaj povos pli saĝe uzi sian monon.

Moderna Martiro: Patro Maksimiliano Kolbe, de A. Buckinx-Luykx. Tr. Leotado De Ruyver. Eldonis Fratoj de l' Karitato, Bierbeek (Belgio), 1961. 63p. Prezo 4 respondkuponoj. Lingvo: bona; preso: bona; karaktero: rekomendata; temo: religia.

Maksimiliano Kolbe estas martiro en la germanaj koncentrejoj. Lin murdis germanoj, kiam li proponis sin por morto anstataŭ alia viro kiun la germanoj arbitre elektis por morto en la koncentrejo. Tio estis la kulmino de lia vivo, vivo komenciĝinta en lia deka jaro per vizio en kiu li vidis la virgan Marion proponi al li du florkronojn, blankan kaj ruĝan.

Inter la infanaĝa vizio kaj la 47-jaraĝa martiriĝo, Kolbe monakiĝis, kaj ankaŭ fondis novan ordenon por konverti nekristanojn. Lia vivo estis plena de problemoj (ne nur la faŝista minaco, sed ankaŭ grava malsano, malriĉeco, mokado fare de aliaj monakoj), kaj malgraŭ tio glorie sukcesis. Ĉi tiu favorema biografio klare prezentas la faktojn de lia vivo, kaj ankaŭ bildojn grandnombrajn.

En la literaturo katolika, ĝi estas bonvena.

GRAVA ATENTIGO

Regulaj legantoj de ĉi tiu gazeto rimarkas ke la adreso de la gazeto ŝanĝiĝis. Ĉio rilatanta al la administrado de la gazeto sendiĝu al 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania. Materialon por inkludo en la gazeto sendu rekte al la redaktoro, aerpoŝte, ĉe la adreso 51 Primrose St., Moonee Ponds, Victoria, Aŭstralio.

La Korelativoj

Malgrandaj konversacioj inter Sinjoro A kaj Sinjoro B, praktikante la korelativojn.

IU - LA BUTIKO

- A. "Al kiu apartenas tiu butikoj?"
B. "Al Sinjoro Blanko; ĝi unue apartenis al lia patro."
A. "Ĉu iu posedis ĝin antaŭ la patro de Sinjoro Blanko?"
B. "Neniu. Lia patro fondis la butikon. Ĉiuj klientoj amas la Blankojn."

IO - SUFIĈA MONO

- A. "Kion vi havas en la mano?"
B. "Tio estas nova plumo. Mia patro donis monon al mi por aĉeti ion. Estus bone ke ankaŭ vi aĉetu plumon -- vi bezonas nenion pli ol plumon."
A. "Mi povas aĉeti ion ajn. Mia patro donas al mi monon por ĉio."

IA - INTER GEPATROJ

- A. "Kian libron legas la infano?"
B. "Ĝi estas libraĉo kian ĝia amikaro ŝategas legi."
A. "Mi plene malaprobis tiajn librojn."
B. "Ankaŭ mi plene malestimas ilin. Estus pli bone ke ili legu neniajn ol tiajn librojn."
A. "Mitre bedaŭras ke ili legas ĉian aĉaĵon."

IE - ĜUSTA PREZO

- A. "Kie vi aĉetis la plumon?"
B. "En la butikoj ĉe la stratangulo proksima al mia hejmo. Multaj aferoj estas tie aĉeteblaj."

IAL - SENDEPENDA SERVISTO

- A. "Kial vi ne pli rapidas?"
B. "Ĉar mi ne havas kialon rapidi."
A. "Ĉu vi do ial intence malrapidas?"
B. "Ne, sed nenio urĝas, kaj tial mi iras laŭ mia deziro."

IAM - INTER GESINJOROJ
TAPENFRAPER


- A. "Edzino mia! Kiam mi manĝos? Mi terure malsatas!"
B. "Vi ĉiam malsatas. Kiam mi havos tempon pretigi la manĝon, tiam vi manĝos, ne pli baldaŭ."
A. "Iam mi mortos pro malsato; tiam vi devos ĝeni vin pro mi."
B. "Mi ne atendos ĝis tiam; mi nun esploras."

IOM - ENSPEZO KAJ ELSPEZO

- A. "Kiom da mono li havas?"
B. "Tiom kiom necesas por vivi komforte."
A. "Kiom li elspezas por alkoholaĵoj?"
B. "Neniom; sed li elspezas iom por legaĵoj kaj amuzo."
A. "Estas eble. Estus pli bone se li ŝparus iom por la posteuloj."

IES - AL KIU LA LIBRO
APARTENAS?

- A. "Kies libron vi legas?"
B. "Ĝi estas nenies. Mi trovis ĝin sur la strato."
A. "Eble ĝi estas ies; ĝi apartenas al la perdinto, ĝi estas ties."
B. "Aŭ eble, ĉar ĝi kuŝis sur la publika strato, ĝi estas ĉies."
A. "Ĉu vi ne povas aĉeti plumon ie alie por malpli alta prezo?"
B. "Ne, nenie; mi klopodis ĉie."



Bonvolu diskutigi la sekvanton inter la membroj de viaj grupoj, kaj sciigi al mi iliajn opiniojn:

1. Ĉiu loka grupo, kiu publikigas kaj distribuas bultenon, sendu al mi 25 ekzemplerojn, anstataŭ sendi apartajn ekzemplerojn al la aliaj grupoj.

La bultenoj de ĉiuj lokaj grupoj estos kunligitaj, kaj speciala kovrilpaĝo aldoniĝos. Ĉiu grupo tiel ricevos de mi en kombinita formo po unu ekzemplero de ĉiu bulteno de ĉiu grupo.

2. Kvankam ĉiu aktuale eldonata bulteno akceptiĝos kun ĝojo, estos plej bone ke ĉiu bulteno havu samajn larĝon kaj longon.

3. Mi esperas ke ĉiu grupo petos siajn membrojn sendi al mi sugestojn pri facile desegneblaj bildoj por estontaj kovrilpaĝoj, bildojn kiujn mi povos facile kopii sur stencilojn.

4. Se la grupoj volos alterne prepari la kovrilpaĝon, tio povos efektiviĝi. Oni povos multoblige la paĝon, aŭ eĉ tajpe kaj desegne prepari

MALLONGAJ NOTOJ

Usonaj kaj kanadaj esperantistoj povas aboni la nepolitikeman gazeton **Pola Esperantisto** favorkoste: nur unu dolaro. La gazeto aperas tute en esperanto, kaj inkludas, i.a., tradukojn el la pola literaturo. Ĉiu numero portas multajn korespondadresojn. Nia samideano usona, A. Holzhaus, aŭtoritatulo pri Zamenhof, ofte aperigas verkojn en la gazeto. Eksterlande oni devas pagi pli ol tri dolarojn por abono. La adreso, al kiu vi povas sendi vian abonon, estas: European Publishers Representatives, Inc., Time Building, 475 Broadway, New York 36.

Ĉiujn esperantlingvajn librojn eldonitajn de la Pola Esperanto-Asocio oni povas mendi ĉe la adreso: The

DE LA SEKRETARIO

Plano por kombinita distribuo de la bultenoj de Esperanto-grupoj.

la ekzemplerojn. Sugestoj: la novjorka klubo povus prepari desegnon pri la Statuo de Libereco, la Ponto de Brooklyn, kc.; la klubo en San Francisco povus desegni la Orpordan Ponton, kc., laŭ propra bontrovo. Se oni preferos ĉiam saman bildon, tio ankaŭ eblas. Sed mi deziras ricevi komentojn pri tia bildo.

5. La sola kosto por loka grupo, krom la necesaj ekzempleroj de la loka bulteno (komence, 25) estos la poŝtkosto, certe ne pli ol dek cendoj por ĉiu bultenokombino.

6. Bonvolu informi min pri ĉiu loka grupo kiun vi konas, krom tiuj en Santa Monica, Los Angeles, San Diego, Sacramento, San Francisco, Napa, Palo Alto, Pasadena, Hillsborough, Santa Barbara, ĉiuj en Kalifornio; Chicago; Missoula, Mont.; N.Y.C.; Warren, Ohio; Bethlehem, Washington; Pittsburgh, Pa.; Washington, D.C.

CONRAD FISHER,

808 Stewart St.,
Meadville, Pa.

Polish Book Importing Co., Inc., 38 Union Square, New York 3.

Ĉu vi ricevas la Okcidentgermanan Revuon? Ĝi estas gazeto aperanta dumonate, priskribanta la vivon, kulturon, kaj politikon de Okcidenta Germanio. Abono estas senpaga. Petu abonon de Limburger Vereinsdruckerei GmbH, (16) Limburg-Lahn, Okcidenta Germanio.


Turismaĵoj ĉiam estas bonvenaj, ĉar ili kutime estas bele ilustritaj, konigas al vi la mondon, kaj plej ofte kostas nenion. Ni sugestas la sekvantajn: Nacia Parko Tatejama, akirebla de la Turisma Fako de Tatejama-maci, Toyama-ken, Japanio; Londono, la Monda Metropolo (kostas unu internacian respondukuponon), akirebla de Edward Ockey,

15 Upper Pines, Banstead, Surrey, Anglio; Salzburg, la Urbo de la Muziko, akirebla de la Urba Trafikoficejo, Salzburg, Aŭstrio; Praha Gvidlibro, (kostas 16 ĉekoslovakiajn kronojn), eldonita de la Eldonejo por Sporto kaj Turismo, Praha, Ĉekoslovakio.

Look Magazine, en sia numero de la 10a de novembro, pasintjara, presis tutaĵan artikolon pri "la internacia lingvo kiu efike funkcias." En Heroldo de Esperanto de nov. 16, nia sekretario Conrad Fisher apelis al

alilandanoj, ke ili inundu la redakcion de Look Magazine per kartoĵoj kaj leteroj por montri al ĝi la vastan uzatecon de nia lingvo.

Nia Redaktoro ruĝigante memoras ke li jam de pli ol jaro redaktadas la Esperanto Review, kaj ĝis nun nemiam prezentis sin. Cedante al postuloj el pluraj lokoj, de personoj kiuj volas konvinkigi ke la redaktoro estas vera homo kaj ne dukapa marsano, li prezentas sube ne nur sian bildon, sed ankaŭ sian biografieton.



Donald kaj Rosemary Broadribb

Donald Broadribb: naskita en 1933; edukita en Rochester New York, kie nia membro Karl Nell estis la unua esperantisto kiun li konis; ricevis la diplomon B.A. ĉe la Universitato de Rochester, en 1954 (ĉefstudis la hispanan lingvon); ricevis la diplomon M.A. ĉe la Universitato de Illinois, en 1956 (ĉefstudis lingvistikon); ricevis la diplomon B.D. ĉe la Seminario Teologia Union en New York City, 1959 (ĉefstudis la hebrean kaj grekan lingvojn); studis 1960-1962 ĉe la Universitato de Chicago, kaj nun ĉe la Universitato de Melburno, por doktoriĝi. Lernis esperanton en 1947, aŭtodidakte, uzante **Esperanto for Beginners kaj Step by Step in Esperanto**. Helpis prepari la fiaskintan **Ilustrita Vortaro de Esperanto**; ĉef-

verkis la bonsukcesan **Supplement to the Esperanto-English Dictionary of Millidge**; fondis kaj redaktis la gazeton **Kristana Bulteno** ĝis 1960; tradukis kaj eldonis **La Libro pri Disĉiplino de la Komunumo ĉe Qumran, La Komentario pri Habakuk de la Komunumo ĉe Qumran, Tobit**. Krom la Esperanto Review, li ankaŭ redaktas regule la bibliografian sekcion de la International Language Review. Li estas membro de Phi Beta Kappa, Phi Sigma Iota (honora societo de studentoj de la latinidaj lingvoj). En septembro, 1961, la trian tagon de la monato, li edziĝis kun Rosemary Eve Dunham, kies bildon vi ankaŭ vidas supre, en kunveno de la 57th Street Meeting of Friends (Quakers), Chicago, de kiu li estas membro.

AŬTOBIOGRAFIA SKIZO

Dorothy Burnham Holland

Mi unue renkontis Esperanton en Highland Park (urbeto apud Chicago) kiam oni donis al mi gimnazian ekzamenon pri legkapablo, en kiu estis artikolo pri internaciaj lingvoj. Dum miaj kvar jaroj en la Kolegio de Lake Forest (1938-1942) mi ne plu renkontis la nomon.

En 1946, mia edzo, kiu tiam instruadis kemion kaj fizikon en Naperville, vidis jurnalartikolon pri leter, sendita al la urbestro de Chicago el Ĉekoslovakio en "stranga" lingvo— Esperanto. Roy parolis al mi pri sia infanaĝa interesiĝo pri Esperanto, vizitis la tradukinton de la letero, kaj aĉetis lernolibron de Esperanto. Mi komencis studi en la trajno dum mi veturadis al Chicago, kie mi laboris kiel stenografiisto.

Ĉiutage mi studis unu lecionon; kaj, vespere, dum mi lavis la pladojn, mia edzo ekzamenis min pri ĝi. Post ses monatoj mi finis la lernolibron, do ni aĉetis korespondanoncon en la gazeto "Esperanto". Ni ricevis 125 respondojn.

Intertempe, ni, kun 4 aŭ 5 esperantistoj en Chicago, kunvenis monate. Kiam ni iris al Eŭropo en la somero de 1955 por viziti 26 el niaj korespondantoj en 13 landoj, ni ankoraŭ ne tre flue parolis, sed post tri monatoj ni estis multe progresintaj.

Baldaŭ post nia reveno, ni trovis idealan kunvenejon por la Esperanto-Societo de Chicago—aparta ĉambro en la centra YMCA, por kiu oni ne postulis pagon se sufiĉaj el ni aĉetis la vespermanĝon tie—kaj dum 5 aŭ 6 jaroj mi estis la sekretario de la grupo.

Ni ĵus revenis de jaro en Eŭropo, kie ni vidis Esperanton en la lernejoj, renkontis novajn Esperanto-amikojn, ĉeestis duafoje internacian Esperanto-kongreson, kaj ricevis multan helpon de la delegitoj en la urboj vizitataj.

★ ★ ★ Books About Esperanto

new and old, are all available from the **Esperanto League Book Service**, Middleton, Wisconsin.



Roy kaj Dorothy Holland

UNIVERSALA ESPERANTO- ASOCIO

La Universala Esperanto - Asocio estas la internacia ligo de Esperantistoj kaj Esperanto-landasocioj. Ĝi administras la internacian sistemon de delegitoj, publikas la monatan gazeton **Esperanto**, grandan **Jarlibron** (en du partoj), ankaŭ librojn kaj propagandilojn. Ĝi provizas magnetofonan servon, korespondan servon, kaj filman servon, al la movado. Se vi estas membro de ELNA, vi aŭtomate ankaŭ estas asocia membro de U.E.A., kaj ricevas ĉiujare membromarkojn kiuj rajtigas vin uzi la servojn de U.E.A. Sed vi ankaŭ povas esti individua membro de U.E.A. Por tio oni devas pagi kotizon ekstran, sed oni ricevas multon:

Membro ricevanta la Jarlibron: \$2.25.

Membro ricevanta la gazeton kaj Jarlibron: \$4.50.


Gazetabono (sen membreco): \$3.50.

Por informoj, kaj pagoj, kontaktu Donald Parrish, 328 West 46th St., Los Angeles 37, California.

DECIDOJ DE LA ESTRARO

(62-VI) Ke ELNA akceptu planon de rabato al neŭtralaj usonaj Esperanto-klubo kaj -societoj rilate al ELNA-kotizoj pagotaj al ELNA fare de tiuj organizoj, kondiĉe ke 100% de la lokaj membroj estu aŭtomate samtempe ankaŭ membroj de ELNA kaj kondiĉe ke la loka organizo formale akceptu la kondiĉojn de la plano proponita de prezidanto Richardson, konforme al la rezolucio de la ELNA-kongreso en Seattle.

Prezidantoj de la permanentaj komitatoj de la Estraro estas: **Publika Informado:** Thomas Goldman, 7008 Millwood Road, Bethesda 14, Md.; **Edukado:** George Falgier, 3622 North Market St., St. Louis 13, Mo; **Membraro:** Dorothy Holland, 1010 Crestwood Place, Santa Barbara, Calif.; **Financo:** Vincent Griffeth, 8556 37th Ave., S.W., Seattle 6, Wash. Por diskuto pri la taskoj de la prezidantoj de la permanentaj komitatoj, vidu la mesaĝon de la Prezidanto en la januar - februara Revuo.



*Kaj nun kion fari,
mi perdis la adreson...*

Nuntempa Bulgario



Are you a subscriber to this magazine? If not, you may wish to receive it regularly by mail, either as a subscriber or as a member of the Esperanto League for North America. As a subscriber you will receive regularly the North American Esperanto Review, with up to date news of Esperanto and its movement. As a member, you will receive the magazine, support the work for Esperanto in this country, and also will automatically be an associate member of the Universala Esperanto-Asocio, entitled to use its world-wide services. We suggest using the coupon below:

To JAY BERRY, Treasurer,
3231 N.W. 62nd St.,
Seattle 7, Washington.

I am enclosing a check/money order for \$. . . , in payment of the following (check which):

- _____ year subscription to the **North American Esperanto Review**, \$2.00.
- _____ year membership in the Esperanto League for North America, including subscription to the **North American Esperanto Review** and associate membership in the U.E.A., \$5.00.
- _____ copy of the booklet **Esperanto, the International Language: Your Passport to World Friendship**, \$.25

Name:

Address:

**ESPERANTO, YOUR PASSPORT
TO WORLD FRIENDSHIP**

Reprints of the popular Special Educational issue of the Review. Extremely useful for publicity work. Keep a supply on hand.

NEW PRICE:

Per Copy: 25c postpaid

Five copies: \$1.00 postpaid

Order from:

Adrian Hughes
476 So. Bailey
Hillsboro, Oregon

**THE NORTH AMERICAN
ESPERANTO REVIEW**

The complete collection for 1961, attractively bound. A permanent record of Esperanto activities in America last year, official League actions, etc.

Price: \$1.80 postpaid

Order from:

Adrian Hughes
476 So. Bailey
Hillsboro, Oregon

**For books in or about Esperanto,
for textbooks, dictionaries, readers**

Esperanto League Book Service

Middleton, Wisconsin

or

Esperanta Libro-Servo, 2222 Crest Drive, El Cajon, Calif.

Esperanto League *for* North America

Every member of the League is a member of UEA

Why not Join Us Now?

Sender:

ESPERANTO PRESS

Oakville, Ontario, Canada

Return and Forwarding

Postage Guaranteed